ĜENERALA INFORMILO

**N-ro 146 novembro 2007**

**BARCELONA ESPERANTO-CENTRO**
Bassegoda, 40, 3º, 1ª
ES-08028 BARCELONA, Hispanio, Eŭropa Unio
Telefono 93 333 80 81, barcelonaesperantocentro@yahoo.es

A T O M O
Junulara Sekcio de B E-C




**MIRINDA 15a Internacia Esperanto –Semajno de la Kulturo kaj Turismo**

Aliĝis 132 gesamideanoj. S-ano Antonio Marco Botella ricevis la 4an Premion "Ada Sikorska. S-ano Takács prezentis libro-biografion de s-ro Hernández Izal. S-ano Miguel Gutiérrez gvidis la Esperanto-kurson. Plie tri Ekskursoj, Esperanto-filmoj, Havanaĵoj kun "kremat", interkonaj vesperoj sigelis la Semajnon.Ĝis la venonta 16a I E-S.





## ZAMENHOF – FESTO

**ATENTON.** La19an de decembro ni planizas Z–Feston kun la celo celebri la datrevenon de Zamenhof kaj la finon de la E-Kursoj de la nuna jaro 2007 en nia sidejo en Casinet.La feston oni komencos je la l9a horo. La novaj kursoj komenciĝos la 9an de januaro.

Ĝis poste kaj Feliĉan kaj Prosperan Novan Jaron 2008.

Nome de la familioj "Girona" kaj "Aragaj", ni deziras esprimi nian sinceran kaj koran dankon al ĉiuj gesamideanoj kiuj ĝentile, pro la malsano de Josefina Girona, kontaktis persone kaj telefone nin aŭ sendis tiun ĉi subskribitan bildkarton de la gepartoprenantoj de la 15a I E-S en Tossa. Certe danke al viaj intereso kaj subteno sendube, oni venkos ŝian malsanon.


29.9-6.10.2007

Kara Josefina,
kun granda espero, ke vi baldaŭ resaniĝos kaj estos kun ni en venontaj "verdaj semajnoj" ni ĉiuj tutkore salutas vin kaj vian edzon.

Bedaŭrinde, ke vi ne povis ĉeesti en Tossa, ni amike salutas vin kaj vian edzon. Yves & Marie-Anne EECKHOUT de Belgio

Amikajn pensojn. Jeanine de Wilde

Rapidan resaniĝon kisojn - Andrée

Espero que te mejores pronto

COSTA BRAVA
L'EMPORDÀ

## KOTIZTABELO DE UEA POR 2008

| | |
|---|---|
| MG - Individua Membro Kun Gvidlibro …9 € | MJ(-T) Individua menbro kun Jarlibro 23 € |
| MA(-T) Individua Membro kaj Esperanto …58" | SA - Simpla abono al Esperanto ……37 " |
| Kto- Abono al Kontakto ………………… 22" | SZ - Societo Zamenhof …………116 " |

Gesamideanoj! Subtenu kaj kunlaboru en la celebrado de la 100a datreveno de la Fondiĝo de Universala Esperanto – Asocio (UEA) 1908 – 2008. Barcelona Esperanto-Centro kiel individua membro de UEA kaj peranto de UEA en Barcelono estas preta kiel ĉiam ricevi kaj sendi viajn donacojn kaj kotizojn en nia sidejo ,Rector Triadó 53 aŭ en Bassegoda 40 3ª 1ª aŭ se vi preferas rekte al la konto de BEC 2100 3198 78 2500010439. Antaŭdankon por via helpo. Kaj rememoru ke la venonta 93a Universala Kongreso de Esperanto, la jaron 2008 okazos en Rotterdam, Nederlando. Ĉu via jam pensis partopreni?

**la Burxa**

Periòdic de Comunicació
Popular de Sants
i barris veïns

## El mar se los lleva...

**Jesús Muñoz Gil, esperantista, veí del barri i col·laborador de diverses publicacions d'àmbit local, ens ha fet arribar una de les seves poesies, dedicada al drama de les pasteres i amb l'objectiu que totes aquestes morts no caiguin en l'oblit.**

Viajar, navegar, navegar,
por placer,
por el cotidiano sustento,
por romper hastíos y miserias,
por la atracción innata del más allá...

Cayucos, pateras,
transporte de vivencias,
de ilusiones, de libertad, y de muerte...

Fugitivos, peregrinos navegantes,
portadores en sus carnes,
mensajes de angustia y pobreza...

Cayucos, pateras,
besando gélidas y cálidas aguas,
guerreras, furiosas, bravas,
espuma blanca vomitando
entre cantos de nereidas,
y sin piedad flagelando
a los soñadores emigrantes...

Oleaje, aullidos de viento, rocas,
aborto cósmico, terrestre y de mares,
trampas traicioneras
en la ruta de la vida y la muerte...

Cuerpos y espíritus solitarios,
al cielo piedad clamando,
entre la bóveda oscura de la noche
y la lámpara solar quemando...

Sueños sin sueños,
rotas ilusiones...
y nostalgicas agónicas...

Sin música ni responsos,
sin discursos y sin cruces,
sin bálsamo de consuelo,
sin besos en el último aliento,
descienden en secreto,
en los antros misteriosos de los mares,
los "navegantes" náufragos y olvidados...

**De "LA ONDO de Esperanto"**

## Nia gazetaro sub lupeo

La broŝuro *Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro* de Aleksander Korĵenkov, aperinta ĉi-somere en la serio *Sed ne el katedro* enhavas, interalie, tabelon pri la eldon- kaj abon- kvantoj. La tabelo ne apartigas sendependajn gazetojn disde membro-gazetoj. Sed, ekzemple, inter 4089 abonantoj de *Esperanto* estas nur 174 abonantoj, kaj preskaŭ kvar mil diverskategoriaj membroj de UEA.

**Internaciaj gazetoj**

| Titolo | Eldon-kvanto | Abon-kvanto |
|---|---|---|
| Esperanto | 5500 | 4089 |
| Monato | 1900 | 1700 |
| Heroldo de Esperanto | 1100 | 1000 |
| Kontakto | 1100 | 893 |
| Sennaciulo | 1000 | 850 |
| Literatura Foiro | 850 | 750 |
| Juna Amiko | 1100 | 700 |
| Espero Katolika | 1000 | 675 |
| TEJO-Tutmonde | 800 | 626 |
| Int. Pedagogia Revuo | 800 | 596 |
| La Ondo de Esperanto | 700 | 545 |
| La Kancerkliniko | 300 | ? |
| Femina | 500 | 200 |
| Naturista Vivo | 90 | 90 |

**Landaj gazetoj**

| Titolo | Eldon-kvanto | Abon-kvanto |
|---|---|---|
| La Revuo Orienta (JP) | 1800 | 1315 |
| Esperanto aktuell (DE) | 1400 | 1000 |
| L'esperanto (IT) | ? | 950 |
| La Lanterno Azia (KR) | 1000 | 835 |
| Le Monde de l'Eo (FR) | 1000 | 700 |
| Starto (CZ) | 670 | 600 |
| La Espero (SE) | ? | 550 |
| Horizontaal (BE) | 600 | 400 |
| Tempo (HR) | 550 | 352 |
| Esperanta Finnlando | 400 | 350 |
| Bulgara Esperantisto | 320 | 300 |
| Pola Esperantisto | 300 | 280 |
| Litova Stelo | 600 | 245 |
| REGo (RU) | 250 | 210 |

La redakcioj (redaktoroj) de aliaj gazetoj ne respondis.

## KOTIZOJ 2008

Barcelona Esperanto-Centro ................. 30 €
Kultura Asocio Esperantista ........... .. 10 "
Hispana Esperanto-Federacio .............. 30 "
La Informilo ........................................ 16 "
La Ondo de Esperanto ........................ 32 "

Libera Trako HEFA ................. 8 €
LA GAZETO ............................ 29 "
La Kancerkliniko........................ 22 "
AŬRORO .................................. 12 "
TEJO tutmonde.............................. 12 "

# TURISMUMADO EN JAPANIO DUM LA 92-a UK

Plenumiĝis nia longjara deziro viziti la landon de la leviĝanta suno - Japanion. Ĉi-jare en Jokohamo okazis la 92-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi kun Floreal aliĝis al ĝi. La kongreson ni ne vere partoprenis, nur la solenan inaŭguron, fermon kaj vesperajn programerojn. Ni decidis turismumi. Ĉiutage ni ekskursis al malsamaj lokoj de la lando por koni ties belecon. Dum la tuta semajno regis varmega kaj humida vetero. De la aerhaveno al Jokohamo ni veturis per trajno. La unua impreso estis ne tro alloga pro iom monotona pejzaĝo kun grizaj dometoj. Kontraste la kongresa halo imponis. La kongreson partoprenis 1900 esperantistoj el 57 landoj. La duono estis japanoj. En du duontagaj ekskursoj ni konatiĝis kun la urbo Jokohamo.

JOKOHAMO troviĝas en la meza parto de la insulego Honŝuo. Ĝi estas la dua plej granda urbo de Japanio; grandega havenurbo kiu kuŝas ĉe la okcidenta flanko de la Golfo de Tokio. La haveno estis malfermita por eksterlanda komerco kun la tuta mondo en 1859. Ekde tiam ĝi fariĝis la ĉefa pordo de Japanio ĝis la Dua Mondmilito. Tra ĝi multe da okcidentaj kulturaĵoj envenis la landon. En Jokohamo troviĝas multaj muzeoj, teatroj, temploj, monumentoj, ĝardenoj, bestoĝardeno, sport-stadiono, ĉina kvartalo kaj aliaj interesaj lokoj.

Du tuttagaj ekskursoj ebligis al ni promeni kaj malkovri la ĉefurbon TOKIO. El alta konstruaĵo, en la 45a etaĝo de gubernia domo, ni povis ĝui panoramon de tiu dek tri miliona urbego. Poste ni alproksimiĝis al la imperiestra palaco, kiu estas malfermita al la publiko nur dufoje jare: la 23-an de decembro kaj la 1-an de januaro. Krome ni vizitis "Edo-Tokio-Muzeon" kaj Nacian muzeon, budhisman templon, grandan bazaron. En "Akihabara" troviĝas multaj elektronikaj vendejoj por elektronikaĵoj, fotiloj, kameraoj ks. Per buso ni traveturis la plej prosperajn stratojn, modernan kvartalon, vidis la japanan parlamentejon, teatron, restaĵojn de "Edo"- kastelo.

Aliaj tuttagaj ekskursoj gvidis nin al HAKONE, KAMAKURA kaj FUĴI-MONTO. Veturante al Hakone ni unue haltis en loko kie antaŭe, dum la Edo-erao, ekzistis kontrolejo. Tie ni povis vidi kiel aspektis tiama etoso pere de ekspoziciaĵoj. Sekva halto estis ĉe la lago "Ashi", kiu formiĝis antaŭ 3 mil jaroj post la erupcio de la vulkano Hakone. En ĝia fono majeste elstaras kaj en la akvo speguliĝas la monto Fuĵi. Poste ni ŝipis por alproksimiĝi al loko kun varmaj fontoj, riveroj kaj sulfuraj gasoj. Kiel multaj aliaj ankaŭ ni gustumis ties specialaĵon; kuiritaj ovoj kiuj havas nigran ŝelon kaj laŭdire plilongigas la vivon je sep jaroj.

En Kamakura ni vizitis kelkajn templojn. La templo "Engakuji" estas la dua el la kvin plej grandaj de Zen en Kamakura. Ĝi estis fondita en la jaro 1282-a. Rimarkindas ankaŭ bronza sonorilo. Tre impona estas monumento de bronza Budho, kiu altas 11,4 metrojn. Ĉe la fino de tiu-ĉi ekskurso ni haltis ĉe plaĝo, kiu pleniĝas dum somero.

Simbolo de Japanio, la 3 776 m alta, Fuĵi monto malkovriĝis al ni en plena beleco, sed tamen sen neĝo sur la pinto kiun oni kutimas vidi sur bildkartoj. Ni elbusiĝis ĉe la kvina nivelo. De tie oni povas supreniri piede, sed ir-reveno postulas kvin horojn. Multaj turistoj entreprenas tiun aventuron.

Japanio postlasis agrablan impreson. Afablaj, ĝentilaj kaj zorgemaj homoj, evoluinta tekniko, pureco, seriozeco kaj precizeco regas la landon. Bonaj servoj, nekutima gastronomio, admirinde bela naturo, rizkampoj, bone prizorgitaj ĝardenoj, parkoj kaj aliaj belaĵoj altiras la atenton de vizitantoj.

*Liba Gabalda*